

**The North American**

**ESPERANTO  
REVIEW**



**Peace on Earth  
Good Will to Men**



NOVEMBER-DECEMBER, 1955

11 + 12

R

## Por plezuraj horoj

La Knaboj de Paŭlo-Strato.....	.30
La Princo kaj Betty.....	.35
La Alia Pasinteco.....	3.00
Gosta Berling.....	.35
Kiso de la Reĝino.....	.75
Kredu min, Sinjorino.....	1.65
Murdo en la Orienta Ekspreso.....	.35
La Nekonata Konato.....	<i>paper, \$1.00; bound 1.25</i>
Princino de Marso.....	.35
Invito al Cielo.....	<i>cloth \$1.50</i>
La nova Testamento.....	<i>\$.25 and .50</i>

Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.



Dr. ZAMENHOF

**Vere Zamenhofa!  
Vere demokrata!  
Vere neutrala!**

## Esperanto-Ligo por Norda Ameriko

Landa Asocio Aliĝinta al Universala Esperanto-Asocio

Ordinara membro, \$3; Geedzoj (ordinaraj membroj, sed ricevas nur unu ekzempleron de la Revuo, ktp.) \$4; Subtena membro, \$5; Patrono, \$10; Dumviva membro, \$50.

Sendu aliĝpeton kaj kotizmonon al la Kasisto: Edw. W. Pharo, Jr., 220 County Line Road, Somerton 16, Pennsylvania. Ĉekoj estu pageblaj al: Esperanto League for North America, Inc.

# *The* NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

*Third Year*

Nov.-Dec., 1955

*No. 11-12*



## **Peace on Earth, Good Will to Men**


There are many religious creeds, many political forms and formulas, many social and economic systems and theories. They may conflict, but one basic desire is common to all the conflicting beliefs:

PEACE ON EARTH, GOOD WILL TO MEN.

Some try to bring peace on earth by imposing their cultures, their religions, their social, economic or political systems on others. For each man believes that his viewpoint is valid and is the best basis for solving the problems that beset mankind. We have now reached that point in history, where it is indeed possible that such an attempt may establish peace on earth. In this Atomic Age, attempts to impose ideas by force may well result in ridding the planet of those who disturb its peace — the human race!

Esperantists, instead, try to start from the basis of good will to men. When the world has a common language, so that the bus driver in Seattle swaps ideas with the conductorette in Praha and the farmer in Iowa with the vineyardist in sunny Spain, when understanding among peoples replaces „understandings” among statesmen, then we can have

PEACE ON EARTH, GOOD WILL TO MEN.



### *The North American Esperanto Review*

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders of 15 or 30 copies of any issue may be ordered, in advance, by members, for 60c and \$1.00 respectively; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 30c per year. (The *Review* reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.)

*Addresses:* Subscriptions and bulk orders should be sent with payment to the Treasurer. Correspondence regarding circulation, including changes of address, etc., should be sent to the League Secretary. Send literary contributions, news items, announcements, etc. to the Editor: F. R. Carlson, 2116 North 35th St., Seattle 3, Washington.

*Deadlines:* The *Review* is placed in the mails about the fifteenth of every second month. Material for publication must be in the hands of the Editor no later than the fifteenth of the preceding month, except for last-minute news items, which will be accepted as late as possible.

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. *President:* John L. Lewine, 50 Overlook Terrace, New York 33, New York; *Vice-President:* James D. Sayers, RFD 2, Lillie, La.; *Secretary:* Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa.; *Treasurer:* Edward W. Pharo, Jr., 220 County Line Rd., Somerton 16, Pennsylvania.

*Membership Dues:* Regular Members, \$3.; Supporting Member, \$5.; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member, but receiving only one copy of publications, etc., \$4.00.

*Members are asked to take careful note of the paragraph above entitled "Addresses" and to address all communications accordingly.*

*Make all checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."*

Many casual readers of the *Review*, while they do not want to undertake a serious study of Esperanto, would like to know what it sounds like, whether one might make sense of the Esperanto portion of the magazine without "taking a course", etc. The *Review*, beginning with this issue, will present a series of articles to answer these and other questions. We hope that, after reading these explanations, you will agree that "we really have something there." *The Editor.*

### The North American Esperanto Review

(*Nordamerika Esperanto-Revuo*)

Vol. 3, No. 11-12.

Nov.-Dec. 1955

The *Review* not only permits, but invites, reprinting of material from its pages, except where special notice, such as notice of copyright, appears.

#### CONTENTS (English)

Peace on Earth, Good Will to Men . . .	1
The Beautiful Language, Esperanto . . .	3
The Simple Language, Esperanto . . . . .	5
The Language to Learn, Esperanto . . .	6
Build No Fences . . . . .	9
Esperanto and a Great Man . . . . .	12

#### ENHAVO (Esperanta)

Novaj Libroj . . . . .	4
Malkonsento pri "Poeziaj Vortoj" . . . .	7
Somera Esperantista Tendaro . . . . .	8
Paco en la Movado, Bonvolo al Samideanoj . . . . .	10
Adresaro . . . . .	11
Esperanto en Norda Ameriko . . . . .	13
Tintilaro . . . . .	14
Por Rimistoj . . . . .	16

# The Beautiful Language, Esperanto

To the non-Esperantist, it may be surprising that Esperanto, the most practical of languages, is also one of the most euphonious. To my (perhaps prejudiced) ear, it is *the* most beautiful of all languages. Of all national languages, the one which sounds most like Esperanto is Italian — language of song.

The English-speaking non-Esperantist, glancing at a page of written or printed Esperanto, is likely to think: "What a barbarous language! Full of *j*'s and *k*'s; words ending in *jn*!"

As a matter of fact, the *j* in Esperanto has the sound of the English *y*. *K* is used invariably for the sound of English *k*, and so appears where English might use *k*, *c*, *ch*, *q*, or *x*.

I suggest that our non-Esperantist readers enjoy a pleasant new experience in euphony by using the table of Esperanto pronunciation to learn our old favorite, "Jingle Bells" in a new form. Learn the pronunciation and fit the new sounds to the familiar tune. Sing "Tintilaro" to your friends at that Christmas party. Learn the chorus first and then turn to page 14 for the complete song.

## ESPERANTO ALPHABET and PRONUNCIATION

The Esperanto alphabet is: a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

The sounds of the vowels (a, e, i, o, u) are the vowel sounds in: "Are there three or two?" The consonant sounds are as in English, except: *c* as *ts* in hats, *ĉ* like *ch* in church, *g* as in go, *ĝ* as *g* in gem, *ĥ* as *ch* in loch, *ĵ* as English *y*, *ĵ* as *z* in azure, *s* as in so, *ŝ* as English *sh*, *ŭ* as English *w*.

The accent is always on the next-to-last vowel. There are no silent letters in Esperanto. Be careful to pronounce separately the consonants in such words as *ĝingro*. Not *feeng-gro*, but *feen-gro*. Pronounce vowels accurately. Do not slur them as most of us do in English. *Vidas* is *vee-dahs*, not *vee-dus*.

In learning without a teacher, pronounce all Esperanto words aloud — and do it often. It is best if you have two or more studying together, to correct one another's errors.




### TINTILARO

D. B. Richardson

(Ho!) Tintilar', tintilar', tintu sur la voj':  
Rajdi en glitveturil', hō kia granda ĝoj-o.  
Tintilar', tintilar', tintu sur la voj';  
Rajdi en glitveturil', ho kia granda ĝoj'.

# Novaj Libroj



## *La Literaturoj de Ĉiuj Landoj Estas Viaj per Esperanto!*

*La Malprudenta Scivolulo*, de M. de Cervantes Saavedra, traduko de Luis Hernandez. Eldonita de la tradukinto. 66 paĝoj kun multaj ilustraĵoj.

Ĉi tiu rakonto, kvankam kompleta en si mem, estas prenita el la grandega kaj fama verko de Cervantes, *Don Kihoto*, kie ĝi aperas en la 33-a ĝis la 35-a ĉapitroj. La nuna libro, kiun oni pli ĝuste nomus broŝuro, reprezentas parton de la traduka laboro, kiun faradas S-ro Hernandez kun la celo finfine prezenti al la Esperanta mondo tradukon de la kompleta verko. La tradukinto petas komentojn de la legantoj pri la lingvo, stilo, ktp., kiun li uzas ĉi tie, por ke la iama eldono de la ampleksa verko havu la plejble altan gradon de perfekteco.

Se oni komprenas, per kia komplika stilo la klasika *Don Kihoto* estis verkita, oni komprenas ankaŭ la eksterordinare malfacilan taskon, kiun frontas ĝia tradukanto. Ĉi tiu specimeno de lia laboro montras la grandan sukceson, kiun li atingis. La longaj frazoj de la klasika stilo montriĝas nekutimaj al la leganto en la komenco, sed per lerta manovrado de nia fleksa lingvo la tradukinto igas la signifon aperi tute klara.

La rakonto estas tre amuza, kaj la libro varme rekomendata.

*Sveda Poemaro*, de Magda Carlsson. Eldonis la "Eldona Societo Esperanto", Stockholm. 112 paĝoj.

Jen nova perlo en nia poezia literaturo. La poemarto de Magda Carlsson estas nepre plejaltranga. Plue, la libro servas kiel antologieto de sveda poezia literaturo. Enestas verkoj de 31 svedaj poetoj, reprezentantoj de sveda poezio dum la lastaj 200 jaroj.

La stilo de Magda Carlsson estas vere bonvena; ĝi estas elokventa sed ne komplika. Ŝi uzas la modernajn "poeziajn vortojn" (vidu la *Revuon* por Julio-Aŭgusto) sed nur ŝpare kaj nur kiam mankas alia formo por la dezirata esprimo. Ŝiaj versoj kvazaŭ kantas per si mem pro la kombino de simplaj strukturoj kaj trafaj esprimiloj.

La poemoj ludas plenan gamon de ĝojo kaj malĝojo, espero kaj malespero, jubilkantoj kaj veplendoj. Multaj el ili havas religian signifon, kiun la tradukantino kapablas reprodukti kun aparta sukceso.

Ankaŭ pro la plaĉa preso, bona papero kaj bindo ĉi tiu libreto estos ŝatata de niaj literaturamantoj.

---

*Libroj recenzitaj en tiu ĉi rubriko estas mendeblaj de Esperanto League Book Service, Middleton, Wis.)*



## THE SIMPLE LANGUAGE, ESPERANTO

TO the person who has struggled with declensions, conjugations, irregular verbs, etc., of a foreign language . . . or even to one who seriously tries to master the complexities of his native English . . . it may be a pleasant surprise to learn that there is a language whose entire grammar is covered by sixteen rules (no exceptions!), which you may be able to memorize in an hour.

Here they are:

1. There is no indefinite article; there is only a definite article (*la*) alike for all sexes, cases and numbers.

2. Substantives end in *o*. To form the plural, *j* is added. There are only two cases: nominative and accusative; the latter is obtained from the nominative by adding *n*. Other cases are expressed by prepositions (genitive *de*, dative *al*, ablative *per*, etc.)

3. The adjective ends in *a*. Case and number as for substantives. The comparative is made by means of the word *pli*, the superlative by *plej*; with the comparative the conjunction *ol* is used.

4. The fundamental numerals (not declined) are: *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *naŭ*, *dek*, *cent*, *mil*. Tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals. To mark the ordinal numerals, *a* is added; for the multiple, *obl*; for the fractional, *on*; for the collective, *op*; for the distributive, the preposition *po*. Substantive and adverbial numerals can also be used.

5. Personal pronouns: *mi*, *vi*, *li*, *ŝi*, *ĝi*, *si*, *ni*, *vi*, *ili*, *oni*; possessives are formed by adding *a*. Declension as for substantives.

6. The verb undergoes no change with regard to person or number. Forms of the verb: time *being* (present) takes the termination *-as*; time *been* (past) *-is*; time *about-to-be* (future) *-os*; conditional mood

*-us*; imperative mood *-u*; infinitive *-i*. Participles (with adjectival or adverbial sense): active present *-ant*; active past *int*; active future *ont-*; passive present *-at*; passive past *-it*; passive future *-ot*. The passive is rendered by a corresponding form of the verb *esti* (to be) and a passive participle of the required verb; the preposition with the passive is *de*.

7. Adverbs end in *e*; comparison as for adjectives.

8. All prepositions govern the nominative.

9. Every word is pronounced as it is spelled.

10. The accent is always on the next-to-last syllable.

11. Compound words are formed by simple junction of the words (the chief word stands at the end). Grammatical terminations are also regarded as independent words.

12. When another negative word is present, the word *ne* is left out.

13. In order to show *direction toward*, words take the termination of the accusative.

14. Each preposition has a definite and constant meaning; but if the direct sense does not indicate which it should be, we use the preposition *je*, which has no meaning of its own. Instead of *je*, we may use the accusative without a preposition.

15. The so-called foreign words (that is, those which the majority of languages have taken from one source) undergo no change in Esperanto, beyond conforming to its orthography; but with various words from one root, it is better to use unchanged only the fundamental word and to form the rest from this in accordance with the rules of the Esperanto language.

16. The final vowel of the substantive and of the article may sometimes be omitted and replaced by an apostrophe.

## THE LANGUAGE TO LEARN — ESPERANTO

The question of how to learn Esperanto is, I hope, gnawing at the minds of the non-Esperantist readers of these pages. The answer depends on: a. How badly you want to learn it; b. how well you want to learn it.

The quickest, easiest and most efficient method is to join a regular class conducted by your local Esperanto group. If you do not find them listed in the Review, write to: Esperanto League for North America, R.F.D. 1, Meadville, Penn.

If you are so unfortunate as to live in one of those benighted localities without an active Esperanto group, or if attending regular classes is too inconvenient, try one of these home study plans:

1. Send \$1.50 to the Esperanto Library, Middleton, Wis., for a copy of the Nelson Esperanto Course. Then send in your work to Mr. Louis Dormont, 123 East 35th St., Brooklyn 3, N.Y., who will correct your work free and offer suggestions to improve your progress. Please send with each batch of lessons a self-addressed envelope with

adequate postage.

**FOR TEACHERS ONLY:** Send a deposit of \$3.00 to the Esperanto Library for a Nelson Kit consisting of the Nelson Course plus a two-language dictionary and two Kenngott Readers. Then send in the exercises to Mr. Dormont. If within three months you send in all the unkeyed exercises, your deposit will be returned and the books are a gift of the organization.

Are you a "do-it-yourself" addict? One of the most fluent Esperantists I have known learned Esperanto by getting an Esperanto Bible and a dictionary and going through both from cover to cover. If you want to be your own teacher, write to the Esperanto Library for a free booklist and make a choice of textbooks and dictionaries from 5¢ up, readers from 10¢.

Want to "just browse" in Esperanto? Buy a dictionary, learn the pronunciation and grammar (explained in this issue) and start reading the Esperanto part of the Review. Try "Casey Jones" first.

GOOD HUNTING!

### HEROLDO DE ESPERANTO

DUONMONATA INTERNACIA  
ORGANO DE LA ESPERANTO-  
MOVADO

**Prezoj:**

Abono tutjara .....	\$4.00
Abono julio-decembro .....	2.00
Abono subtenanta .....	8.00
Anonceto po 25 vortoj .....	.50

**Nordamerika peranto:**

Donald E. Parrish  
328 West 46th Street  
Los Angeles 37, Calif.

### la Praktikol

LA GAZETO DE LA MONDPOPOLO

Monata internacia ilustrita revuo

**Prezoj:**

Jarabono (nur por kalendara jaro) kun membreco en Uni- versala Ligo:	\$2.00
Anonceto po 25 vortoj:	.50

**Nordamerika peranto:**

Donald E. Parrish  
328 West 46th Street  
Los Angeles 37, Calif.



## MALKONSENTO PRI "POEZIAJ VORTOJ"

Mi ne povas konsenti kun Waringhien (paĝon 12, July-August, 1955, eldono de The North American Esperanto Review) kiam li citas Grabowski "---La tago malvarma, malgaja, sensuna---" kaj daŭre diras, "verso taŭga por doni la impreson de sunplena somertago; tiun bildon la uzo de *mal* --- ne forigas de la spirito de la leganto."

Oni ne vidas vorton popece, krom kiam oni estas lernanta ĝin. Foje ke la vorto estas parto de la mensa vortaro, oni vidas ĝin tuj, ĉiujn literojn samtempe, kaj la signifo trafas la cerbon kiel unuaĵo. Tiel *malgaja* ne estas du vortoj kun apartaj signifoj, sed unu vorto kun nur unu signifo. Tio estas, mi memorigas vin, por iu post la komencanta grado. Oni ne pensas unue "la malo de" kaj poste "gaja" kaj sekve pli poste "La malo de gaja estas malgaja." Tia aranĝo estas strikte por la lernanto.

Nur kiam la lernanto estas progresinta al tiu punkto, ke ĉiu ideo estas tiel firme kunligita en lia memoro kun definitivaj stimuliloj formitaj el certaj skribitaj aŭ parolitaj signoj, estas eble, ke li povas uzi la lingvon flue por efiki sur la mensoj de aliaj same kleraj. La poeto, verkisto, aŭ parolanto kiu uzas vortojn ne posedatajn de sia leganto emociigas nur sin mem. Kaj se lia menso tiel necerte entenas iun vorton, ke li akiras duoblan signifon el ĝi, li estas en bedaŭrinda stato.

Rigardu la anglajn vortojn: scream kaj cream, clean kaj lean, ice kaj nice, graceful kaj disgraceful, bold kaj cold, mislead kaj lead, exceed kaj concede, promote kaj demote, tread kaj bread,

ktp. Al ni, kiuj estas denaske angleparolantoj, ĉiu el ĉi tiuj vortoj stimulas tute apartan senton kaj elvokas tute apartan memorbildon. Unu ne sugestas alian krom per speciala komparo.

Nu, estas stulte diri, ke Waringhien ne jam delonge estis sendanĝere preter la komencantula punkto. Por kiu, do, li timas la kaptilon de la vorto "mal"? Kredeble por la leganto de iu altvalora poeziaĵo? Sed estas difektaĵo en tiu argumento. Ĉiu verkisto bone scias, ke ĉiam estas iuj legantoj, kiuj ne povas akcepti eĉ la plej simplan vorton el poemo aŭ novelo sen tordante ĝin dolore. Ne, li kredeble timas pro la poeto, por ke li eble estu miskomprenata. Tamen, oni devas riski tion.

Ĉe mi *malgaja* ne pli sugestas *gaja* ol *disgraceful* sugestas *full of grace*. Oni povas kunligi ian vorton al ia sento. Estas entute nenia signifo enestanta en kolektaĵo el literoj, ĝis post la menso akceptas iun signifon.

Kio ĝenas min: Kiel Cox malpermesas la sendifinan modon post iu prepozicio krom *por*, *anstataŭ*, *antaŭ ol*, kaj *krom*, dum la Plena Vortaro diras, ke la sendifina modo estas tre bona post *sen*. Ĉu ne estas ia aŭtoritato pri tiaj aferoj?

Ĉe mi, se oni povas diri: "La hundo kuregis tra la arboj, tordante sin jen kaj jen", kial ne diri: "kiuj ne povas akcepti eĉ la plej simplan vorton el poemo aŭ novelo *sen* tordante ĝin dolore"?

Jam nun mi eltrovas, ke Esperanto estas vera lingvo. Ĉu ĝi ne estas akiranta amason da nekonsekvencaĵoj, same kiel la "naturaj" lingvoj, kune  
(Daŭrigo sur paĝo 14)

## Somera Esperantista Tendaro

*el letero de Vuk Ehtner, Ĉeĥoslovakio, al Roan Orloff*

La SET (Somera Esperantista Tendaro) estas somera kamp-lernejo por Esperanto-instruado. Ĝi okazas ĉiujare; jam kelkajn fojojn ĝi okazis. Jam pasintan jaron mi partoprenis ĝin kiel instruisto. Ĝi estas dividita en tri partojn po du semajnoj. En la unua etapo partoprenas komencantoj, en la dua tiuj, kiuj jam iom scias la lingvon kaj ricevas pli altan instruadon, kaj en la tria etapo estas instruataj estontaj grupgvidantoj kaj instruantoj por la lingvo. Ĉijare mi elektis por mi la duan etapon kaj en supera kurso instruis 12 gejunulojn pri konversacio kaj E-literaturo. Entute en tiu ĉi etapo partoprenis 53 personoj el 22 lokoj. Ni loĝis sub 19 tendoj; nur 5 logis en kabano proksima al la tendaro. La reguloj kaj la disciplino en SET estas sufiĉe severaj — laŭ skolta maniero. Ĉiutage estis preciza programo, kiu komenciĝis per vekado, bonordigo de la tendoj, hisado de la ŝtata flago, diskonigo de la ordonoj por la opaj grupoj por la tuta tago, 4 horoj da instruado, komunaj manĝoj, posttagmeze sportludoj, labor-taskoj (koncerne riparojn necesajn, kompletigon de la tendar-ekipo, k. s.), vespere bivaka fajro, dormo-iro. Belega tempo! Rapide ĝi pasis! Mi laboris multe, des pli rapide flugis tago post tago! Iam mi estis sufiĉe laca. Fine venis la ekzamenoj. Ĉiu kursano ricevis diplomon.

Mi loĝis en la 9a tendo. Super la enirejo al la tendara placo paradis granda verda stelo. Super la tendaro flirtis krom la ŝtata flago la verdstela E-standardo, alte de sur la lignotraba observa turo, konstruita de la tendantoj. La masto, sur kiu flirtis la ŝtata flago, staris meze de negranda bedo cirkloforma, kie verda musko formis kvinpintan stelon; estis el ĝia mezo, ke leviĝis

la masto.

La sperto el tiuj SET-oj estas tre bona. La aranĝo estas io tute nova, unika. Ĝi donas novajn, fortajn impresojn — paralelajn al tiuj el niaj UK-oj. Imagu nur: la pasintan jaron mi partoprenis en la 3a etapo, kie estis jam pli spertaj Esperantistoj, kiuj akceptis la decidon, paroli plejeble nur Esperanton dum la 2 semajnoj. Ili bone sukcesis. Estis mirinda impresoj, vagi vespere inter la tendoj kandellumigitaj kaj aŭdi el ilia interno murmuradon aŭ flustradon en nia kara lingvo. Tiel bona disciplino regis! Aŭ oni sunumis sin ĉe la arbarrando kun Esperleciono en la manoj kaj parkeris ĝin. Aŭ se vi estus vidinta la entuziasmon de 8—13-jaraj geknaboj por ne perdi unu okazon por ekscii ion novan (en la nunjara 2a etapo), por ne malfrui unu minuton en la kurso, la timon por ne esti registrata en malpli alta grado de kursoj — por ricevi bonan noton ĉe la ekzameno — mi pensas, ke vi ankaŭ estus tuŝita ĉe la koro, ĝis larmoj. Ĉiutage ni lernis unu novan E-kanton. Ĉiutage foriris el la tendaro amaso da pk-oj kaj leteroj al ĉiuj partoj de l' mondo. La poŝtejo en la najbara vilaĝo neniam havis tiom da alilandenaj sendaĵoj. (Sed ankaŭ enlandaj estis multaj ĉiutage.)

En la 2a etapo okazis entute 3 kursoj. Krom la mia jam menciita estis du kursoj por komencantoj, unu por geknaboj malpli ol 12-jaraj, la alia por pliaĝuloj.

Estis bele vidi, kiel harmonie kunlernas en la sama kurso pastro katolika kaj pastro de la Eklezio de Moraviaj Fratoj (aŭ Ĉeĥaj Fratoj, Husanoj). Ili iafoje promenis kune, brako-ĉe-brako; ĉiuj kolektiĝis sub unu signo, kun la sama celo fina.



# BUILD NO FENCES

*A new Esperantist explains, better than your Editor could,  
Esperanto's "Interna Ideo".*

Kara Samideano,

. . . and what an interesting salutation that is! The term "fellow-thinker" is never used in English, so, it being new to me, I had to give it pause. It gave me a sense of "membership" in something or other . . . a feeling not usual to me. Then I realized that I had just joined ELNA, and so I was a member of something. And for the first time!

I guess I have been almost too much of an extremist in "holding out" from joining things. But, almost without thinking of it as "joining", I applied for membership in ELNA and UEA. Only now, as I reflect upon the issue, does it begin to dawn upon me what this means. My reason for not joining groups has been very simple: it is like putting up a fence to separate one's self from all that is not within the limited idea he has joined. If I join the "X" Church, I am apart from the "Y" Church; if I join the red race, I am apart from the yellow race; if I join a nation, I am apart from all other nations . . . for does not preference of one imply opposition to the other? And so I have remained as much a "free man" as anyone possibly could in our world, refusing to "put up more fences." I am against fences, boundaries, separations . . . when

they are limits and obstacles to one man's understanding of another.

Yet now, as I reflect upon my casual joining of all that encourages Esperanto, I can see why it was such an easy and natural thing for me to do. Here, at long last, is an idea that is *against no one!* Not any man, no group, no nation, no culture, is opposed by or can possibly be harmed by Esperanto. Each and all can only gain and grow as Esperanto gains and grows.

Because Esperanto is against no one, no one could intelligently be against it. I dare say that there is not a man alive, who being asked the question: "Do you believe that there should be a language that is spoken and understood by everyone in the world?" must not answer instantly, "Yes, that is a good idea."

And so I have joined something; those who sustain and promote the good idea, Esperanto. I am left with no sense of being separated from anyone by that joining. The only sense I have is a foretaste of the joy that every man will feel when he is able at last to communicate instantly and easily with every other.

Yours respectfully,

Robert W. Hannum.

*Desert Springs, California.*

## Paco en la Movado, Bonvolo al Samideanoj


En Amerika Esperantisto (Julio-Ok-tobro, 1955), ties redaktoro atakis la Universalan Esperanto-Asociion, akuzis la gvidantojn de la Asocio pri "intrigoj", "absolutismo", ktp. — eĉ sugestis starigon de nova tendaro. La redaktoro citis, kiel apogilon por sia disrompa politiko, parton de artikolo en *Heroldo de Esperanto* (25 aŭgusto, 1955), sed el-lasis tiun paragrafon, kiu rekte kontraŭas ĉiajn disrompajn klopodojn. Ni citas la paragrafon kiun AE ne presis:

"La tria fakto, kontraŭa al la du aliaj, estas tre ĝojiga. Ĝi donas esperon por tre harmonia kunlaborado inter la gvidantaro de nia Asocio en la estonteco. kaj al tia harmonia kunlaborado ni volas alvoki la tutan asocianaron, la tutan esperantistaron,<sup>1</sup> eĉ tiujn kiuj estis en la opozicio kaj kiuj ne konsentas pri imagaj aŭ efektivaj eraroj ĉe iuj gvidantoj. Estu Bolonjo grava mejloŝtono en la historio de la Esperantomovado, kaj fariĝu Rotterdam la komenco de nova fruktodona etapo en la historio de nia Universala Esperanto-Asocio. Ni havas kapablajn homojn je ĝia pinto, feliĉe, kvankam ni, kaj ili mem, memoru ke ankaŭ ili estas nur homoj, kun homaj talentoj kaj homaj mankoj, kiujn — la mankojn — klopodu ni laŭeble pardonu, sed ili mem laŭeble eviti. Ni forgesu pri la pasintaĵoj, kaj ni sekvu niajn kapablulojn — por la bono de nia Universala Esperanto-Asocio, por la bono de la Esperantomovado kaj de la homaro!" (*1kursivoj miaj. fre*)

En *La Praktiko* (sept., 1955) aperis artikolo pritraktanta la ŝanĝojn interne de UEA. Legu ĝin! Jen citaĵo el ĝi.

"Necesaj estas diversaj ŝanĝoj. La aktuala pozicio de la Movado postulas,

ke la Centra Oficejo forlasu la kamparan vilaĝeton Heronsgate kaj transiru al pli granda urbo. I a nuna Sekretario, S-ro Rapley, ekŝiĝis. Evidentiĝis maleble, trovi en Londono alian oficejon kaj aliajn oficistojn kaj la komitato diskutis la eblecon transiri al alia lando. La nuna Konstanta Kongresa Sekretario, S-ro Stuttard, deziras ree ekloĝi en propra lando kaj jam pli frue anoncis, ke Bologna devos esti lia lasta Kongreso. Jam pli frue, la redaktoro de la revuo "Esperanto", S-ro Hans Jakob, pro sia sanstato ne plu povis plenumi la tutan redaktoran taskon kaj tial, jam de la Haarlem-a Kongreso, funkciis kiel helpredaktoro S-ro Reto Rossetti. Nun S-ro Jakob definitive rezignis pri sia tasko. Krome, S-ro Rossetti jam devas lasi la helpredaktorecon pro tro temporabaj profesiaj laboroj. La nova statuto, pri kiu voĉdonis la landaj asocioj en la pasintaj monatoj, estis akceptata la 15an de julio kun grandega plimulto de meze 90%. Do, en Bologna ĝi jam funkciis kaj surbaze de ĝi la Komitato devis elekti novan estraron kaj (konkludo sur paĝo 15)



Vidu la ge-knab-ojn. Kio-n ili far-as? La ge-knab-oj tir-as ŝtip-on al la Kristnask-a fajr-o. La ŝtip-o est-as grand-a. La ŝtip-o est-as pez-a. Unu knab-o ne pov-as tir-i ĝi-n. Sed ili tir-as kun-e kaj la task-o est-as facil-a. Ĉu la ge-knab-oj ne don-as bon-an ekzempl-on al la Esperant-ist-ar-o?

## POR VIA ADRESARO:

### ADRESSANĜOJ

North American Esperanto Review,  
2116 North 35 St., Seattle 3, Wash.

John L. Lewine,  
50 Overlook Terrace, New York 33, N.Y.

### NOVA ADRESO DE UEA

Universala Esperanto-Asocio, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado, UEA  
77, Grasmere Avenue, Wembley,  
Middlesex, Anglujo.

### LOKAJ GRUPOJ

P.O.Box 222, Niagara Station,  
Buffalo 1, N.Y.

1237 North Alexandria Ave.,  
Los Angeles 29, Cal.

4725 Brierecrest Ave., Lakewood 11, Cal.

P.O. Box 4367, San Diego 4, Cal.

2116 N. 35 St., Seattle 3, Wash.

### POR KANADANOJ

Centro por Kanadaj Esperantistoj,  
Box 52, Terminal A, Toronto, Kanado.

### POR ROMKATOLIKOJ

P.Golobic, 17724 Grovewood Ave.,  
Cleveland 19, Ohio.

### POR PROTESTANTOJ

James D.Sayers, Route 2, Lillie, La.

### POR INSTRUISTOJ

B.L.Hanson, Warwick, N. Dakota.

### POR SCIENCISTOJ

Prof. F.J.Belinfante, Dept. of Physics,  
Purdue University, West Lafayette, Ind.

### POR KOLEKTANTOJ

Louis Obreczian, Box 51, Waterman, Pa.

(Ĉiuj adresoj en Usono, se sen landnomo)  
La Revuo petas rimarkigon pri plujaj not-  
indaj adresoj, precipe de lokaj grupoj.

### POR MONDFEDERALISTOJ

D. E. Parrish,  
328 W. 46 St., Los Angeles 37, Cal.

## ESPERANTO EN FILMOJ

SPECIAL DELIVERY estas nova en Eŭropo farita filmo kun sufiĉe multe da Esperanto-dialogo. La ĉefaj steloj estas Joseph Cotton kaj Eva Bartok. La filmo montras fantazian landon, kie la loĝantoj parolas Esperanton. Distribuata de Columbia. Vidu en via gazeto kiam ĝi aperos.

Esperanto estas parolata kaj priparolata en la kolorfilmo THE WORLD'S GREAT RELIGIONS, triparta dokumenta filmo preparita de S-ro Lew Ayres.

### Novaj-Malnovaj Propagandiloj

La ĉiam plej efika kaj favorata flugfolio, "Esperanto at a Glance", nun estas representita kaj havebla, 10 por 1¢ ĉe: Esperanto Library, Middleton, Wisconsin.

## ANONCOJ

*Tarifo: \$1 ĝis sep linioj. Dek procenta rabato por du- aŭ plifojaj aperoj. Petu informon pri tarifo por pli grandaj aŭ multfoje aperantaj anoncoj aŭ reklamoj.*

### Veraĵ Amulet-rememorigaĵoj de Afriko

Nun estas haveblaj en malgranda kvanto amuletoj, kiuj vere protektas vin kaj donas al vi bon-sorton, se vi kredas je tio. Unu vera specimeno kaj la sendado rekte al vi kostas nur \$1. Aĉetu hodiaŭ, kiam ankoraŭ ili estas haveblaj. L. Heilberg, Poste Restante, Kitwe, Northern Rhodesia.

### KORESPONDU !

10 junaj klubanoj volas korespondi per leteroj aŭ ilustritaj poŝtkartoj kun Esperantist(in)oj, prefere junaj, el diversaj urboj en Usono. Armand DETHOMAS, Fleury-les-Aubrais, Loiret, Francujo.

## Esperanto....and a Great Man



DR. ZAMENHOF

WHAT is the history of Esperanto? Where and when did it start? Or is it something that "just grewed"?

The first book on Esperanto was published on July 14, 1887. Its history since that date will be discussed in other articles in the *Review*.

However, this issue should go into the mails on the fifteenth of December, so one phase of the history of Esperanto is especially suited to presentation at this time. This is a great date in the Esperanto movement, for it is the birth date of Dr. Ludwig Lazarus Zamenhof, author of Esperanto.

Dr. Zamenhof was born on December 15, 1859, the son of a Jewish family in Bielystok, Poland, then a part of Czarist Russia. His father, a school teacher, supplemented his teaching salary by work for the censor's office, for which he was peculiarly fitted by reason of his knowledge of languages. Thus, by working day and night, he was able to provide a good education for his children.

In Bielystok, the people were sharply divided by language barriers. Russian was the language of the rulers, Polish of the aristocracy, the peasants spoke Lithuanian and the tradesmen and merchants mostly Yiddish. The Russian masters of the land, to divert the people from hatred of Czarist oppression, used the mutual suspicions of groups which could not understand one another to stir up hatreds among them.

Ludwig Zamenhof, even as a boy, realized that the main basis of the clashes among the groups lay in the language diversities. He dreamed of a day when the

world would have one language, so that neighbor would no longer fear and hate neighbor because he could not understand him. *For men fear that which they do not understand.* He resolved, early in life, that he would devote his life to the development of a language so simple that everyone would learn it along with his native tongue, to get acquainted with those using different languages.

We have not the space to tell the entire fascinating story of Dr. Zamenhof's struggle, nor of his joyful discovery of the principle of affixes and word-building which made Esperanto possible. The story of Dr. Zamenhof's life can be read in Edmond Privat's "Life of Zamenhof." I promise that anyone interested in the language problem will find this book most interesting reading.

But I must mention the origin of the name, "Esperanto." A struggling young optician could not, in those days, let his name be identified with anything as visionary as an international language. So Dr. Zamenhof published his works over the name "Dr. Esperanto." The word "esperanto" means, in the international language "one who is hoping".

So "the international language of Dr. Esperanto" came to be known as "the language of Esperanto" and finally simply as "Esperanto."

Today every Esperantist is "esperanto" . . . one who is hoping that the hundredth anniversary of Zamenhof's birth, in 1959, will find all the world using "the international language of Dr. Esperanto", so that the dream of the young Jewish lad will come true and neighbor will no longer fear and hate his neighbor because he does not understand him.

# ESPERANTO EN NORDA AMERIKO

## DECIDOJ DE LA ESTRARO

1. Akceptis la eksiĝon de S-ano Richardson kiel Redaktoro.

2. Akceptis la eksiĝon de S-ano Carlson kiel Estrarestro.

3. Nomis S-anon F.R. Carlson Redaktoro.

4. Akceptis la eksiĝon de S-ano Carlson kiel Estrarano.

(La Estraro nun pribalotas elekton de nova Estrarestro.)

## ORDONOJ de la PREZIDANTO

Ke ĉiu Esperantisto havu feliĉan jaron.  
Obeu la ordonon de nia Prezidanto !

S-ano D.B. Richardson, kiu evoluigis la Revuon ĝis ĝia nuna bonegeco sed devis eksiĝi pro malsano, nun resaniĝas, kaj kapblas fari iom da laboro. Li nun estas Literatura Redaktoro de la Revuo.

Librojn por recenzi oni bonvole sendu al:  
D. B. Richardson, 3412 North Mullen,  
Tacoma 7, Washington.

### ATENTU, KANADANOJ !

ERARO en UEA-JARLIBRO (2a parto)

La UEA-peranto por Kanado estas la Ĉefdelegito: W.D.B. Hackett, 362 Soudan Avenue, Toronto 7, Ontario, Kanado.

### NI BEDAŬRE ANONCAS

Ke S-ano E. A. Peck, longe delegito de UEA en San Diego, mortis pro koratako en oktobro. Li estis 80-jaraĝa.

### NI GRATULAS

Gesamideanojn Duane kaj Suzanne Walter. Sinjoreto Craig Cameron Walter nun estas iom tro juna (du monata), sed li baldaŭ lernu Esperanton.

? ĈU NENIO OKAZAS ?

en *via* grupo?

Pro la klopodoj de S-ano D. E. Parrish, la nova jarlibro de UEA montros pli ol 40 novajn delegitojn en Usono.

Ok gesamideanoj el San Diego vizitis la novembran kunsidon de la Los Angeles Esperanto-Klubo. Pli ol 40 membroj ĉeestis.

Publikaj kunsidoj de la Societo Esperantista de Seattle okazas la unuan merkredon de ĉiu monato ĉe Technocracy Hall, 2208 8th Ave. Ĉe ĉiu publika kunsido oni prezentos specialan programon aŭ ekspozicion.

S-ano Howard Borden, Estrarano de ELNA, intencas aŭtoveturi transkontinenten fruprintempe, kredeble en aprilo, kaj deziras dum la veturado renkonti kiel eble plej multajn gesamideanojn. Li kredeble iros el New Jersey al Key West, al New Orleans, al Memphis, al Arkansas, al Grand Canyon, al Monterey, Meksikio, al Yuma, al California, al Seattle, al Yellowstone, returne tra Denver, St. Louis, Wisconsin, Chicago, Indiana, Ohio, Meadville, Pa., Kanado, New England, al New York.

S-ano Borden petas ke ĉiuj, laŭ au proksimaj al tiu iradvojo, kiuj volas renkonti lin dum la vojaĝo, tuj skribu al li pri detalaj aranĝoj. Li ankaŭ petas sugestojn por fari la veturon pli farinda.

S-ano H.G. Borden, 110 So. Overbrook Ave., Trenton 8, N.J.

S-ano Klukowski anoncas starigon de vesperklasa Esperanto-kurso ĉe Universitato Marquette, en Milwaukee.

S-ano Wm. E. Baff en Washington, D.C., havas "Ateston pri Kapableco", donitan al li en 1906 de la Brita Esperanto-Asocio. Kredeble ĝi estis la unua donita al usonano de la Brita Asocio.

POEZIAJ VORTOJ. (Konkludo)

kun troega vortaro? Laŭ mi, oni povas perdi tiun akuzativan *n*. Miaj korespondantoj gaje ĵetas ĝin en la rubejon. Pro indigno mi trovas min superuzanta ĝin, kaj tio ne helpas iun ajn.

Nu, sufiĉo sufiĉas, miaj fingroj stumbas. Sed ili ne povas stumbli escepte ke la cer--- faligu ĝin, mi petas.

R. H. Clark


Aliaj Esperanto-gazetoj ankaŭ havas malfacilaĵojn. Svenska Esperanto-Tidningen jene klarigas pri malfrua apero de sia julia-aŭgusta numero: Pro la multjare rekordaj varmeĉo kaj sekeco en Svedujo, la presejo ne presis la materialon, ĉar la kompostistoj semajnon post semajno forstis — por bani sin!

!

Ĉe nia Revuo, la Redaktoro faras la kompostadon. La Redaktoro ne permesas ke la kompostisto banu sin.

!

Kaj tio plenigas la paĝon.



Vidu la kamenon. La kameno estas ruĝa. La kameno estas bela. Ĉe la kameno la ge-infanoj pend-ig-as ŝtrump-et-ojn por ke oni en-metu Krist-nask-ajn donacojn.

La Revuo estas tri-jar-aĝa infano, kaj tre ŝatas donacojn. La Redaktoro (Li estas ankaŭ kompost-ist-o, pres-ist-o, bind-ist-o, dis-send-ist-o kaj pres-ej-a koboldo) estas pli ol tri-jar-aĝa. Sed li estas infan-mens-a. Li ŝatas ludi per alfabetoj, koloroj, bildkliš-oj, kaj tiel plu.

La Redaktoro pend-ig-os siajn ŝtrump-et-ojn ĉe la bela ruĝa kameno. Li antaŭe riparos la truojn, por ke la ĉekoj ne trafal-u. Li esperas baldaŭ havi novajn lud-il-ojn por amuzi sin kaj siajn kun-lud-ant-ojn. (Ĉekoj estu pag-obl-aj al: The North American Esperanto Review.)

Ne tro prokrastu. Estos mal-varm-e en januaro sen ŝtrump-et-oj.

TINTILARO (Jingle Bells) D.B.Richardson Copyright 1955. Kopirajto 1955.

Glitante sur la neĝ' malantaŭ solĉeval'  
Rapide iras ni sur kampo kaj en val';  
Sur la ĉevala vost' gajigas tintilar';  
Glitraĵdo kaj kantado estas ĝojo sen kompar'.

(Ho!) Tintilar', tintilar'. tintu sur la voj';  
Rajdi en glitveturil', ho kia granda ĝoj-o.  
Tintilar', tintilar', tintu sur la voj';  
Rajdi en glitveturil', ho kia granda ĝoj'.

Semajnon antaŭ nun glitraĵdi iris ni,  
Fraŭlino Fanny Bright kaj tutapude mi.  
Sed nia ĉevalaĉ', lin trafis malfeliĉ',  
Li tiris nin sur neĝmontet' kaj sekvis renversig'.



## KION ILI HAVAS, KION NI NE HAVAS ?

En Minas Gerais, Brazilo, je la 30a de novembro lastjare, okaze de la finiĝo de la Kompletiga Kurso, 103 esperantistoj ricevis diplomojn. Kiu nordamerika grupo kampanjos por preteri tiun sukceson ?

---

Konscienco: Mallaŭta voĉeto, kiu diras ke iu alrigardas.

---

### PACO EN LA MOVADO (el paĝo 10) decidi pri ĉio.

“Kiel redaktoro estis nomata S-ro William Auld, unu el la “Skota Kvaropo” kaj bone konata de ĉiuj, kiuj sekvis nian literaturon en la lastaj jaroj.

“Kiel Konstanta Kongresa Sekretario estis nomata S-ro G. Fighiera el Torino, kiu jam delonge montris sin bona organizinto en la itala movado kaj ankaŭ dum la nuna kongreso.

“Estos starigata administra oficejo en Nederlando, provizore en Rotterdam (Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando) kiu ekfunkcios la 15an de novembro sub gvidado de F-ino M.H. Vermaas. En la transira periodo laboros en la centra oficejo S-ro Stuttard. Restos en Londono, kiel ĝis nun, la Centro de Esploro kaj Dokumentado, sub gvidado de Prof. Lapenna.”

ELNA ankaŭ forte malaprobas ĉiajn disrompajn taktikojn, sed la Revuo ne donas al *AE* tian respondon, kian ĝi indas ĉar — jen la sezono de “Paco sur Tero, Bonvolo al Homoj”. Eĉ redaktoroj estas homoj. La Revuo permesas al si nur unu akran komenton:

Se temas pri “absolutismo” — kiuj ne pekas, *tiu* jetu la ŝtonojn !

---

## ATENTU ! HELPU !

La Revuo estas dulingva pro tio, ke ĝi estas ducela. Unue, ĝi devas propagandi Esperanton al neesperantistoj. Tion ĝi devas fari anglalingve. Due, ĝi devas prezenti interesan materialon en Esperanto, por ke vi ne tediĝu, sed senpacience atendu ĉiun novan numeron.

La Redaktoro celas, ke la anglalingva parto estu agrese propagandeca por Esperanto, kaj por mondpaco bazita sur interkomprenado inter popoloj per Esperanto. En la Esperanta parto, estu la Revuo la plej leginda en Esperantujo.

Ni bezonas stabon de verkistoj — kaj karikaturistoj ! Sed la Revuo ne havas monon por kompensi ilin. Ni do proponas al vi la plej altvaloran premion, kiun ni povas doni — la Revuon mem !

Por ĉiu karikaturo — la Revuo ĉiam estu amuza — kaj por ĉiu esperantlingva artikolo aŭ rakonto de 500 vortoj aŭ pli, kiun ni akceptos kaj uzos, se la verkinto loĝas en Nordameriko, li rajtos nomi lernejon, bibliotekon aŭ alilandan amikon, al kiu ni sendos la Revuon senpage dum unu jaro.

Se la verkinto loĝas ekster Norda Ameriko, ni sendos la Revuon senpage dum unu jaro al li, aŭ al alia adreso, ekster nia kontinento, kiun li elektos.

---

## KONSTANTE PORTU

### LA VERDAN STELON

---

La Revuo ne nur permesas, sed invitas, represon de materialo prezentita en ĝi, escepte kiam aperas speciala noto, ekzemple noto pri kopirajto. Ni petas, sed ne postulas, ke oni menciu la Revuon ĉe represo kaj sendu al ni du ekzemplerojn. Antaŭdankon !

---

RIDU ! KANTU ! ĜOJE ANTAŬEN !

## POR RIMISTOJ

POETOJ NE LEGU!

Mi ŝatas rimfari. Ĉu vi? Mi ŝatas kanti baladojn. Ĉu vi? Mi ŝatus kanti la famajn usonajn baladojn Esperante. Ĉu vi?

Mi parttradukis "Casey Jones", sed ne povis memori la tuton. Jen brila ideo! Vi helpu min, por ke Casey fariĝu samideano.

### CASEY JONES<sup>1</sup>

Venu, fervojistoj, kaj aŭskultu dum mi

Rakontos al vi pri la histori'

De Casey Jones, fama fervojist'.

Usonanoj rememoras lin kun sent' de trist'.

Rekantaĵo:

Casey Jones algrimpis la kabanon;  
Casey Jones, ferdekon sub la pland';  
Casey Jones algrimpis la kabanon,  
Finvojaĝis al la Promesita Land'.

Oni vokis lin labori en la frua maten'.

La edzino adiaŭis kun malgaja mien'.

Li algrimpis la kabanon kaj, ferdekon sub  
la pland',

Finvojaĝis al la Promesita Land'.

Tra relaro de South Memphis<sup>2</sup> vere flugis li.

Relpintoj protestegis per dolora ekkri'.

Oni sciis per la sono de l'plendanta maŝin'

Ke kurema Casey Jones nun veturigas ĝin.

La sukceso de l'irado estis malbona vet'

Ĉar inter la reloj fluis riveret'.

Casey kriis, "Vi elsaltu!" al Sinjoro Ŝmira-  
ĉap.

"Jen du lokomotivoj! Nepras interfrap'!"

Nu! Ĉu vi povas provizi pluajn strofojn, aŭ pli bonajn variaĵojn de la supraĵ?

Ne malkaŝu la aferon al la poetoj! Dum la Literatura Redaktoro forestas, ni Rimistoj starigu GRANDAN konkurson.

(Vidu apudan kolonon)

(<sup>1</sup>Prononecu "Kejsij Ĝonz". <sup>2</sup>Prononecu "Saŭth Memfis"; *th* kiel lispanto prononcas s.)

● **ESPERANTOFONO** is the new 45 rpm unbreakable phonograph record which contains a detailed presentation of the phonetic system of Esperanto both by individual sound and by connected sentences of prose and poetry. Prose spoken by Prof. Dalmau, member of the Academy of Esperanto; poetry (*La Espero* and *La Vojo*) declaimed by Catalan poet Vila. Complete price only \$2.98 including postage and printed text of contents. Allow about 4 weeks for delivery. Order now from R. C. MARBLE, P. O. BOX 2081, VAN NUYS, CALIF. or direct from BELPOST, APARTADO 5164, BARCELONA, SPAIN.

**L E A R N  
ESPERANTO**

### VIA AŬTOMOBILO

#### Reklamas Esperanton

kiam ĝi portas reklamstrion (bumper strip) ĉi tian. Fluoreska verda koloro "lumas" en la mal-lumo. Mendu po 20c, 6 por \$1 aŭ 12 por \$2. Esperanto-Societo de San Diego, Box 4367, San Diego 4, Calif.



**PLEJ ALTA PREMIO:** Ĉiu, kies rimo aperos en ĉi tiu angulo, rajtos nomi sin Rimisto de la Revuo.

**FLANKA PREMIO:** Por ĉiu strofo, kiun ni prezentos, la verkinto rajtos nomi lernejon aŭ bibliotekon, al kiu ni sendos la Revuon senpage dum unu jaro.


*Casey Jones estu Esperantisto!*

*Gajan Festsezonon al Vi!*

TEXT BOOKS, DICTIONARIES, READERS


The Esperanto Teacher .....	\$ .45
Esperanto for Beginners .....	.10
Nelson's Esperanto Course .....	1.50
Step by Step in Esperanto.....	1.50
The Edinburgh Pocket Dictionary.....	.85
Fulcher and Long English-Esperanto Dictionary.....	2.35
Millidge Esperanto-English Dictionary.....	2.50
Johano kaj Silvio.....	.30
Junaj Detektivoj .....	.35
Gaja Leganto per Esperanto.....	.30

Write for complete Book-List:

Esperanto League Book Service, Middleton, Wis. 

Stacio Sukceso

**la-bo-ru, la-bo-ru, la-bo-ru!**



APPLICATION BLANK

I enclose \$.....for: (check)

Regular member .....	\$ 3.00
Supporting member .....	5.00
Patron .....	10.00
Life member .....	50.00
Man and wife.....	4.00
Subscription only .....	1.75

Name .....

Address .....

City .....

*Print your name and address clearly. Send to:  
Esperanto League for North America, Inc., Somerton 16, Pa.  
Advise the League promptly if you change your address.*